

Neergaard klarigas la financan situacion (oni ankoraŭ ŝuldas al la presisto, sed aliflanke kuŝas la mono en orientaj landoj). Li petas la mendontojn mendi kaj pagi rekte ĉe KO-KO (por ŝpari la rabaton).

T. Hoda kowski (Pollando): La libro estas tre valora, sed la artikoloj devas esti pli aktualaj. Estonte estas plej bone aperigi ĝin en du branĉaj partoj. Estas bone kunlabori kun Akademio de Esperanto.

Prof. Sirk (Aŭstrujo) rekomendas aĉetigi la libron por sciencaj bibliotekoj kaj tiel ebligi baldaŭan aperon de la dua volumo.

A. Blid (Svedujo) demandas ĉu ne estas pli bone pliampleksigi *Sciencan Revuon* ol pensi al la dua volumo. Neergaard respondas ke SR estas por ĝeneralaĵoj, ne por originalaj esploroj.

Prof. Popoviĉ (Jugoslavio) transdonas la rimarkon de d-ro Roelofs (Nederlando) ke la dua volumo estu sen lingvaj makul(et)oj. Neergaard respondis ke oni ne povis eviti tion nun, ĉar la manuskriptoj estis ofte tre malbonaj de la lingva vidpunkto.

Post tio kelkaj ĉeestantoj diskutis ĉu oni uzu neologismojn, aŭ preferu oni utiligu la ekzistantajn vortojn kun pliaj sencoj, kiun diskuton la prezidinto finis per la konkludo ke oni devas serĉi plej bonan solvon — kaj en unu kaj en alia direkto.

B. Popoviĉ (p.m.)

025.45 : 408.92

025.45 : 412

KELKAJ KOREKTOJ KAJ RIMARKOJ PRI LA

INDEKSO

publikigita en la antaŭa numero sur pp. 75—80.

p. 75/-3, anstataŭ: „do”, legu: „tamen”.

p. 77/-19, anstataŭ: 82/89 **Literaturo alilingva**, legu: 81 **Literaturo Esperanta (originala)**.

p. 78, interŝanĝu la tekstojn post *E* : 025.45 kaj *E* : 027(079.5).

p. 78/-6, forstreku la linion *E* 05NP.

p. 79/4, anstataŭ: *E* 093.0 : 063, legu: *E* 093 = 0 : 063.

p. 79/-3, legu: *E* 282.1 scienca : popola lingvo 6 42; 7 51, 53.

p. 80, fine de la listo aldonu:

L Gazetoj Literaturaj

L 48 NP Norda Prismo 8 100.

p. 80/-12, D-ro Wüster rekomendis tamen plu uzi por Sc. R. la indicon 001(05) = 089.2(100). Tiel estu.

408.92

E 3-14

VORTOJ EL LA FUNDAMENTO DE ESPERANTO

ekster la alfabetvico de la Universala Vortaro

Postnotoj

La samtitola artikolo (Sc. R. 11, 71-74.) kaŭzis relative abundan korespondadon.

Oni riproĉis al mi, ke la referencoj de la vortoj de la Antaŭparolo (signitaj per simpla A) ne estas sufiĉe precizaj. Kompletige jen do la referencoj laŭ la paĝoj de la 8-a eldono. Tie la Antaŭparolo ampleksas la paĝojn V ĝis XI. Simplige, mi notas per arabaj ciferoj:

absolut'	A5,9	dokument'	A8	oficial'	A5,7,8,10,11
adres'	A9	energi'	A6	paradoks'	A9
angl'	A7	Esperant'	A5,6,7	paralel'	A10
arĥaism'	A10	ide'	A11	princip'	A6,10
aŭtor'	A6,7	instituci'	A7,10,11	sankci'	A11
aŭtoritat'	A5,7,9,10,11	kompetent'	A8	special'	A5
Bulonj'	A9	kongres'	A9,11	tekst'	A8
centr'	A10,11	kontrol'	A8,9	valor'	A10
dogm'	A8	literatur'	A9	Varsovi'	A11

D-ro Ing. Wüster afable sendis al mi ekzempleron de sia verko: „*La Oficiala Radikaro*”, Berlin kaj Dresden, 1923; 70 paĝoj 10,5 × 16; kaj ĝia „*Suplemento*” (4 p., 1932). Tiu libro kaj ankaŭ ties suplemento entenas la vortojn kiuj estas la temo de mia artikolo. Ili tie estas markitaj per la signo f'.

Nu, mi devas konfesi, ke rilate al Wüster mankas en mia listo la du vortoj *krestomati'* kaj *muzik'*.

Mi ne povis trovi *krestomati'* (apartenanta al unua parto de la Dua O. A. kaj do signenda en mia listo per: 2a) malgraŭ nova traserĉo de la Fundamento. Povas esti, ke tiu vorto iel elfalis el mia eldono, en kiu ja mankas ekz-e *sanilo* en la 42-a Ekzerco (vidu Sc.R. 1959, p. 74: „la ĝusta teksto de la Ekzercaro”) kaj ankaŭ *leĝo* (ekzakte: Lé-ĝo.) en la 2-a Ekzerco kaj inter la du vortoj *paĝo* kaj *ĝis*.

Aliparte mi ne povis trovi la vorton *krestomati'* ankaŭ en la du eldonoj greka kaj itala de 1907, kiujn mi posedas, krom en reklama teksto pri la „Fundamenta Krestomatio”. Tiu teksto, sama en ambaŭ eldonoj, kuŝas tuj ĉefine de la Ekzercaro kaj antaŭ la Universala Vortaro.